



Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 35 (kvara serio), numero 3 (136), 2026
ISSN 1385-2191

Eldonas

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
interlingvistiko.net ♦ @CED_interling

Redaktas

Başak ARAY  ♦ KIMURA Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ) 
Jorge Antonio LEONI DE LEÓN  ♦ Bengt-Arne WICKSTRÖM 

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

I	Eventoj	3
1	48-a Esperantologia konferenco, Graz, 2026-08-06	3
1.1	Organizantoj	3
1.2	Loko	3
1.3	Priskribo	3
1.4	Programo	3
2	SHESL-konferenco 2027: Esperanto – 140 jaroj: ĉi tio ne plu estas projekto, Parizo, 2027-06-09 – 11	4
2.1	Organizantoj	4
2.2	Loko	4
2.3	Priskribo	5
3	Plialtigi lingvan konscion: La simpozio de ILEI 2026, Zaozhuang, 2026-07-11 – 12	5
3.1	Organizantoj	5
3.2	Loko	5
3.3	Priskribo	5
3.4	Programo	6
4	Somera lernejo pri lingvo-politiko kaj planado (LPLPE25/26) kaj Nitobe-simpozio, Universidad de Costa Rica, 2026-08-03 – 07	8
4.1	Organizantoj	8
4.2	Loko	8
4.3	Priskribo	8
4.4	Programo	8
II	Universitata kaj esplora agado	11
1	Informado pri raŭmismo dum internacia konferenco ĉe Αριστοτέλειο Πανεπιστήμιο Θεσσαλονίκης (Aristotela universitato de Saloniko), Grekio	11
2	Miksita intensa programo ĉe ok kunlaborantaj eŭropaj universitatoj: Unua eldono de multpolusa Erasmus+a-interŝanĝo pri Esperanto kompletigita	11
III	Kulturo	13

IV	Personoj	13
V	Bibliografiaĵoj	14
1	Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj	14
2	Fakrevuaj artikoloj	14
3	Libroj	14
4	Libroĉapitroj	14
5	Revu-numeroj	14
5.1	Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik	14
5.2	Language Problems and Language Planning	14
5.2.1	Language Problems and Language Planning, 50:1 (2026). ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.	14
5.2.1.1	Enhavo	14
5.3	Esperantologio / Esperanto Studies	16
5.3.1	Esperantologio / Esperanto Studies, Nova Serio 7 (15) (2026). ISBN 9781595694515. ISSN 1311-3496.	16
5.3.1.1	Enhavo	16
5.4	Investigationes Linguisticae	18
5.5	Beletra Almanako	18
5.6	Literatura Foiro	18
5.6.1	Literatura Foiro, 57(340) (aprilo 2026). ISSN: 0393-2907-26004.	19
5.6.1.1	Enhavo	19
5.6.2	Literatura Foiro, 57(341) (junio 2026). ISSN: 0393-2907-26004.	19
5.6.2.1	Enhavo	19
6	Novaĵletero	20
6.1	Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)	20
6.1.1	La lettre d'information de l'OEP, 107 (junio/julio 2026).	20

I EVENTOJ

1 48-A ESPERANTOLOGIA KONFERENCO, GRAZ, 2026-08-06

1.1 *Organizantoj*

CED – Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj
Klaus Schubert kaj Bengt-Arne Wickström

1.2 *Loko*

La EK okazos kadre de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en
Congress Graz
Sparkassenplatz 1-3, AT-8010 Graz

1.3 *Priskribo*

De 1978 la [Esperantologia konferenco](#) rolas kiel scienca konferenco kaj grava forumo, kie fakuloj, studentoj kaj scivolemuloj povas diskuti kaj kunesplori pri ĉiuj fenomenoj rilataj al esperantologio, interlingvistiko, internacia komunikado kaj lingva (mis)kompreno. La ĉefaj celoj de la EK estas krei kunlaboreman spacon kaj stimuli originalajn alirojn al la pritraktataj temoj. Ĝi krome rolas kiel klerigejo por esperantistoj kaj fonto de ideoj, artikoloj kaj raportoj por la esperanto-komunumo.

1.4 *Programo*

09:00 Malfermo

BENGT-ARNE WICKSTRÖM kaj KLAUS SCHUBERT (*Germanio/Hungario kaj Germanio*)
Bonvenigo kaj mallonga prezento de CED kaj ĝiaj periodaĵoj

09:30 Unua sesio

BERNHARD TUIDER (*Aŭstrio*)
La diĝitaj dokumentoj en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko
GABRIELA SKONIECZNA (*Pollando*)
La Biblioteko Hector Hodler en la Pola Nacia Biblioteko: defioj kaj ŝancoj

11:00 Kafopaŭzo

11:30 Dua sesio

PASCAL DUBOURG GLATIGNY (*Francio*)

Scienco sen datumoj? La franca nacia kolektado de esperanto-arkivoj en la ekosistemo de memorkonservado

RUBÈN FERNÁNDEZ ASENSIO (*Hispanio*)

La Esperanto-muzeo de Subirats

12:30 Tagmanĝa paŭzo

14:00 Tria sesio

ALESSANDRA MADELLA (*Ĉinio/Italio*)

Dokumenti Esperantan spektaklon: La multkomunikila arkivo de «1910»

ESZTER «STELA» BESENYEI-MERGER (*Hungario*)

Morojo – la plej granda fanino kiu iam ajn vivis

15:00 Kafopaŭzo

15:15 Kvara sesio

EKATERINA V. BEBENINA (*Rusio*)

Al indekso de lingva justeco: metodika provo surbaze de statistikaj datumoj

PHILIPPE PLANCHON (*Francio*)

Diverseco de la konstruitaj lingvoj: semiologia kaj enunciativa perspektivo

SÉBASTIEN MORET kaj PASCAL DUBOURG GLATIGNY (*Svislando kaj Francio*)

Esperanto – 140 jaroj: ĉi tio ne plu estas projekto (pri scienca konferenco en Parizo en 2027)

2 SHESL-KONFERENCO 2027: ESPERANTO – 140 JAROJ: ĈI TIO NE PLU ESTAS PROJEKTO, PARIZO, 2027-06-09 – 11

2.1 Organizantoj

Sébastien Moret (UNIL-SHESL) kaj Pascal Dubourg Glatigny (Centre Alexandre Koyré, CNRS-EHESS-MNHN)

2.2 Loko

Campus Condorcet, Parizo

2.3 Priskribo

En 1887 Lazaro Ludviko Zamenhof lanĉis el Varsovio sian projekton por internacia lingvo per serio de broŝuroj – eldonitaj en la rusa, pola, franca kaj germana lingvoj – kiuj skizis la lingvajn kaj intelektajn principojn de estonta «internacia lingvo». La verko inkluzivis skizon de lingva sistemo, kompleta kun gramatiko kaj vortprovizo, kaj montris ĝian aplikon per kelkaj ekzemploj. Ĉi tiu propono ne nur celis iĝi la dua lingvo de komunikado de la homaro; ĝia aŭtoro ankaŭ asertis sian konvinkon, ke ĝi helpu mildigi la antagonismojn kaj malamikecojn devenantajn de malegalecoj inter popoloj kaj nacioj.

Por marki la 140-an datrevenon de ĉi tiu fondinta publikigaĵo, internacia konferenco celas kunvenigi specialistojn el diversaj disciplinoj por ekzameni ĉi tiun unikan eksperimenton, kiu komenciĝis kiel lingva kaj loka projekto antaŭ ol iom post iom disetendiĝi en tutmondan socian kaj kulturen fenomenon. Vidu [ĉi tie](#).

3 PLIALTIGI LINGVAN KONSCION: LA SIMPOZIO DE ILEI 2026, ZAOZHUANG, 2026-07-11 – 12

3.1 Organizantoj

[Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj \(ILEI\)](#)

Alessandra Madella

3.2 Loko

Kadre de [la 59-a kongreso de ILEI](#) en

Esperanta fako

Departemento de fremdaj lingvoj

枣庄学院 (Zaozhuang pedagogia altlernejo)

Zaozhuang

3.3 Priskribo

[La Simpozio](#) estas la plej grava parto de la Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu okazas ĉiun jaron en malsama lando. Ni multe ĝojas, ke en 2026 gastigas ĝin Zaozhuang-a Universitato, kie troviĝas la plej granda Esperanto-Muzeo el Azio kaj kvarjara Esperanto-fako. La celo de la Simpozio estas internacie kunparoligi esperantistajn kaj neesperantistajn universitatanojn por antaŭenigi nian pripensadon pri la instruado de Esperanto kiel ponto por interkultura kaj interfaka diskuto.

3.4 Programo

Sabato, 2026-07-11

13:30 Malfermo

ALESSANDRA MADELLA
Enkonduko de la unua tago

13:40 Sesio 1: Enklasaj strategioj kaj teknologioj por konscia lingvolernado

RAMA MATHEW
Plialtigi la metakognan konscion de la lernantoj

FATEMEH MADISEH
Altigi verko-kapablojn pere de generipova AI

BARBARA LORANC
Peraj strategioj en interkultura virtuala interŝanĝo

IINO ATSUSHI
Kiel japanaj lernolibroj pritraktas lingvajn temojn?

ANTJE NEUHOFF
Virtualaj lingvokafejoj

16:10 Paŭzo

16:30 Sesio 2: Plialtigi lingvan konscion pere de arto

PAOLA BERTOLONE
Lingvo en la teatro

SARA SPANÒ
Magia realismo en itala literaturo

JULIAN E. PREECE
Lingvoj en la laboro kaj vivo de Elias Canetti

Dimanĉo, 2026-07-12

09:00 Malfermo

ALESSANDRA MADELLA
Enkonduko de la dua tago

09:10 Sesio 3: Metalingvistiko de la retorika vidpunkto

ALESSANDRA MADELLA kun respondo de DAVID J. DEPEW
W. James kaj E. L. Thorndike pri mensa disciplino kaj transferoj

09:50 Sesio 4: Kreskigi konscion pri lingva diverseco en la mondo

BENGT-ARNE WICKSTRÖM
La graveco de lingva statuso kiel identigilo por ĝia travivo

AIKAWA TAKUYA

Eta historio de hangula literatura stilo

YU MEI, TAN ZHONGQI kaj WEI YONGQUAN

Etna kultura interŝanĝo en Yunnan

PAN ZHONGWU

Limoj de lingvo, limoj de mondo

NINA DANYLYUK

La ukraina kaj la ĉina lingvoj en la lingvokultura aspekto

12:30 **Paŭzo**

13:30 **Sesio 5: Esperanto kaj metalingvistika kompetento 1**

ILONA KOUTNY

Lingva kaj kultura konsciigo tra Esperanto

KATALIN KOVÁTS

Konscia memtaksado de lingvaj kapabloj baze de KER

FRANÇOIS LO JACOMO

La lerneja eksperimento de Helmut Sonnabend

SPOMENKA ŠTIMEC

La Zagreba metodo

15:30 **Paŭzo**

15:50 **Sesio 6: Esperanto kaj metalingvistika kompetento 2**

BERNHARD TUIDER

La Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko

EKATERINA V. BEBENINA

Metalingvistika kompetenteco kaj plurlingveco

KIMURA GORO

Kiel plialtigi interlingvan konscion

A. GIRIDHAR RAO

Strategioj en Barato por plialtigi lingvan konscion

VICENTE MANZANO-ARRONDO (VIKO)

Konkludaj rimarkoj

18:00 **Fino**

4 SOMERA LERNEJO PRI LINGVO-POLITIKO KAJ PLANADO (LPLPE25/26) KAJ NITOBESIMPOZIO, UNIVERSIDAD DE COSTA RICA, 2026-08-03 – 07

4.1 Organizantoj

Instituto de Investigaciones Lingüísticas (INIL), Universidad de Costa Rica, kunlabore kun la Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

Jorge Antonio Leoni de León

4.2 Loko

Sala Joaquín García Monge, Facultad de Letras, Universidad de Costa Rica kaj rete pere de Zoom

4.3 Priskribo

[La Seminario](#) celas provizi forumon por renkontiĝo, komunikado kaj interŝanĝo de ideoj inter esploristoj, instruistoj kaj studentoj laborantaj en la kampoj de lingvopolitiko, lingvoplanado kaj taksado de lingvopolitikoj. Tiu ĉi jaro post la seminario okazas [Nitobesimpozio](#).

4.4 Programo

Lundo, 2026-08-03

- 09:00 CARLA AMÓROS NEGRE (*Universidad de Salamanca*)
Investigar en política y planificación lingüísticas desde un enfoque crítico y etnográfico (Esplorante lingvopolitikon kaj planadon el kritika kaj etnografia perspektivo)
- 12:00 **Paŭzo**
- 14:00 MARK FETTES (*Simon Fraser University*)
Elementoj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado por daŭripova mondo
- 17:00 **Fino de tago 1**

Mardo, 2026-08-04

- 09:00 CECILIA GIALDINI (*Queen's University Belfast*)
Evaluating linguistic justice for stability and peace (Takso de lingva justeco por stabileco kaj paco)
- 12:00 **Paŭzo**

- 14:00 ALICE LEAL (*University of the Witwatersrand*)
Language policy in theory and practice: The case of South Africa (Lingva politiko en teorio kaj praktiko: La kazo de Sud-Afriko)

17:00 **Fino de tago 2**

Ĵaŭdo, 2026-08-06 – Nitobesimpozio, tago I

- 08:30 MARK FETTES (*Simon Fraser University*)
Lingvo kaj tero en indiĝena perspektivo: Paradigmoj kaj programoj
- 09:30 MICHELE GAZZOLA (*Ulster University*)
Ĉu oni povas taksi lingvan justecon?
- 10:30 CARLA AMÓROS NEGRE (*Universidad de Salamanca*)
Los derechos lingüísticos a propósito del Decenio internacional de las lenguas indígenas: cómo frenar la minorización (Lingvaj rajtoj en la kunteksto de la Internacia jardeko de indiĝenaj lingvoj: kiel haltigi malplimultiĝon)
- 11:30 Demandoj
- 12:30 **Tagmanĝo**
- 14:00 JOSEPH FARQUHARSON (*University of the West Indies*)
Creole languages in the digital age: Issues and prospects / Linguas criollas en la era digital: desafíos y perspectivas (Kreolaj lingvoj en la cifereca epoko: Problemoj kaj perspektivoj)
- 15:30 ALÍ GARCÍA SEGURA (*Universidad de Costa Rica*)
Cuando el sentido se pierde en la interpretación: Suwĩ' y otros conceptos bribri que al español jurídico (Kiam signifo perdiĝas en interpretado: Traduki Suwĩ'-n kaj aliajn Bribri-konceptojn al hispana jura lingvaĵo)
- 16:30 Demandoj
- 17:30 **Fino de tago I**

Vendredo, 2026-08-07 – Nitobesimpozio, tago II

- 09:00 CECILIA GIALDINI (*Queen's University Belfast*)
“Localising” linguistic transitional justice: The role of City Councils in language policy and conflict transformation in Northern Ireland / «Localizar» la justicia lingüística transicional: el papel de los ayuntamientos en la política lingüística y la transformación del conflicto en Irlanda del Norte («Lokigante» lingvan transiran justecon: La rolo de urbaj konsilioj en lingva politiko kaj konflikta transformo en Nord-Irlando)
- 10:00 ALICE LEAL (*University of the Witwatersrand*)
A long way to linguistic justice in South Africa (Longa vojo al lingva justeco en Sud-Afriko)

- 11:00 MARIÉLOS MURILLO (*Universidad de Costa Rica*)
La implementación de las políticas de públicas para elevar los niveles de competencia lectora en la educación costarricense. Período 2010-2025 (La efektivigo de publikaj politikoj por altigi la nivelon de legadokapablo en la kostarika edukado. Periodo 2010-2025)
- 12:00 **Tagmanĝo**
- 13:30 CARLOS SÁNCHEZ AVENDAÑO (*Universidad de Costa Rica*)
La política lingüística desde las comunidades: Escenarios de gestión del patrimonio idiomático-cultural en los pueblos indígenas de Costa Rica (Lingva politiko ekde la komunumoj: Scenaroj por administri lingvan kaj kulturan heredaĵon ĉe la indiĝenaj popoloj de Kostariko)
- 14:30 RENÉ ZÚÑIGA ARGÜELLO (*Universidad Nacional de Costa Rica*)
Política lingüística en los criollos del Caribe centroamericano (Lingvopolitiko por la kreolaj lingvoj de la centroamerika Karibio)
- 15:30 Demandoj
- 16:30 **Solena fermo**

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 INFORMADO PRI RAŬMISMO DUM INTERNACIA KONFERENCO ĈE Αριστοτέλειο Πανεπιστήμιο Θεσσαλονίκης (ARISTOTELA UNIVERSITATO DE SALONIKO), GREKIO

En konferenco *Crossroads of languages and cultures: Intersecting epistemological perspectives in multilingual education*, ĉe la Aristotela universitato de Saloniko, partoprenis delegacio de Kultura Centro Esperantista. Oni aranĝis programeron pri esperanto laŭ la raŭmismo penso-skolo. La prezento *Identity through language education: The case of the Esperanto citizenry* klarigis filozofiajn kaj historiajn fundamentojn ne nur de la Esperanta Civito, sed ankaŭ de ties lingvotesta sistemo kaj mekanismo de civitaniĝo. Per interesigo pri tiu studokazo, lingvistike kaj institucie, oni esperas krei konscion en universitataj kaj fakaj medioj pri esperanto kiel identigilo por diaspora lingva minoritato.

Heroldo komunikas 906 4-B, 2026-04-08 (redaktita kaj mallongigita).

2 MIKSITA INTENSA PROGRAMO ĈE OK KUNLABORANTAJ EŬROPAJ UNIVERSITATOJ: UNUA ELDONO DE MULTPOLUSA ERASMUS+A-INTERŜANĜO PRI ESPERANTO KOMPLETIGITA

Finiĝis en junio 2026 la interŝanĝo «Esperanto as an interdisciplinary field of transnational innovation» laŭ la Erasmus+a-kadro BIP («Blended Intensive Programme», vidu IpI **35:1** (134) 2026). La ideo, male al la tradicia Erasmus-interŝanĝo, estas, ke unu universitata sidejo agu kiel gastiganto de la partoprenantoj en kulmina surloka semajno fine de ses-monata periodo, dum la resto de la tempo estas pretigo de tia intensa semajno per interreta lernado. La interreta fazo inkluzivis Esperanto-kurson cele al legipova lernado, kiun gvidis Dennis Keefe el Hispanio, kaj diversaj atelieroj kaj specialaj lecionoj de la akademiaj respondeculoj de la partoprenantaj universitatoj, ofertitaj al studentoj de ĉiuj partneraj universitatoj, ĉiuj en Eŭropo sed larĝsence, ĉar partneris interalie Boğaziçi Üniversitesi Istanbul (Bosfora Universitato el Istambulo), Turkio. Partoprenis entute 27 studentoj plus 2 universitatanoj (STT «staff training»). Kunordigis la Université de Tours tra ĝia akademia kunordiganto Philippe Planchon, kaj 10 instruistoj (t.e. 6 ankaŭ surlokaj, ĉiuj distancaj). En la semajno en Tours estis 7 surlokaj helpantoj, el kiuj 6 estis doktoriĝantaj studentoj. La temo estis la fenomeno Esperanto, kaj la laborlingvo estis la angla. La plej sukcesa partnero sendanta studentojn estis Universiteit van Amsterdam. En la surloka semajno intervenis 7 reprezentantoj de esperantoasocioj kaj 6 lokaj esperantoklubanoj, tiel, ke la studentoj povis sperti almenaŭ la aŭskultadon de flua Esperanto. La reto de partneraj universitatoj estis sukcesa kaj jam pretiĝas dua eldono la venontan akademian jaron, kies gastiga

sidejo por la surloka semajno estos Uniwersytet Warszawski (Universitato de Varsovio).

Federico Gobbo, Universiteit van Amsterdam (iomete redaktita)

III KULTURO

IV PERSONOJ

V BIBLIOGRAFIAĴOJ

1 DISERTACIOJ KAJ DIPLOMLABORAĴOJ

2 FAKREVUAJ ARTIKOLOJ

3 LIBROJ

4 LIBROĈAPITROJ

5 REVU-NUMEROJ

5.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*

5.2 *Language Problems and Language Planning*

5.2.1 *Language Problems and Language Planning*, 50:1 (2026). ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.

5.2.1.1 *Enhavo*

- Brian P. Bennett: *Placing religious language policies: Locative to utopian*

Mapado de religia lingvopolitiko: Loka ĝis utopia

Religio estas grava sed nesufiĉe studita kampo de lingvopolitiko. Inspirita de la verko de Jonathan Z. Smith, influa teoriulo en la kompara studo de religio, ĉi tiu artikolo celas antaŭenigi esploron pri la religia kampo per mapado de du kontrastaj «topografioj» kaj iliaj akompanantaj lingvopolitikoj. Loka topografio estas religia orientiĝo, kiu emfazas fiksecon, sakrecon, hierarkion kaj purecon, dum utopia («senloka») valorigas liberecon, movadon, interkonekton kaj la transcendecon de limoj. La rusa ortodoksa konservado de la eklezia slava kaj katolika subteno por Esperanto servas kiel respektivaj ekzemploj, kun la daŭrigo de la latina en katolikismo prezentanta miksitajn kazojn. La artikolo sugestas, ke la loka-utopia distingo ankaŭ povas lumigi sekularajn politikojn, kiel ekzemple la enradikiĝo de la cirila alfabeto fare de la rusa registaro kaj la ĝeneraligita uzo de la Frutiger-tiparo en gravaj mondaj flughavenoj.

- Hisham M. Ali: *One language, many hierarchies: Corpus - status interplay in intralingual translation between Classical Arabic and Egyptian Arabic*

Unu lingvo, multaj hierarkioj: korpusa - statusa interagado en enlingva traduktado inter klasika araba kaj egipta araba

Oni ofte traktas enlingvan tradukadon en la araba kiel simpligon, sed dume ĝiaj implicoj

rilate lingvoplanadon restas neesplorataj. Ĉerpante el la traduko farita de al-Shāmīlī de la verko *Risālat al-Ghufrān* de al-Ma‘arrī (2016) en duonedukitan parolan araban lingvon, ĉi tiu artikolo argumentas, ke enlingva tradukado konsistigas lokon kie korpusa lingvoplanado kaj statusa lingvoplanado interagas reciproke anstataŭ disvolviĝi en laŭlinia sinsekvo kie formo sekvas funkcion. Kvar dinamikoj ekzemplas tiun interagon. Per minimuma grafikigo kaj kongruigo kun ŝtataj diskursoj pri heredaĵa renovigo, la traduko elstarigas modernigon super normigo. Interteksta poziciigo ĉerpas el pli fruaj eldonoj kaj interlingvaj tradukoj por fortigi kompreneblon kaj roligi la klasikan araban kiel kodon kiu postulas peradon. Etikedado disrompas hierarkiojn kaj provokas komunikmedian polemikon per prezento de la verko kiel tradukon en la egiptan lingvon. Funkcia redistribuo vastigas la vulgaran lingvoformon en rakontadon kaj religian diskurson. Tiuj dinamikoj starigas enlingvan tradukadon kiel lingvoplanan rimedon kiu modernigas lingvajn resursojn, renegocas hierarkiojn, kaj redistribuas aŭtoritaton trans komunikajn domajnojn.

- Juan Dong, Yawen Han, Dan Li, & Haoxuan Kong: *Language ideologies and practices of international students in a course in Chinese for Academic Purposes (CAP)*

Lingvaj ideologioj kaj praktikoj de internaciaj studentoj en kurso «La ĉina por akademiaj celoj» (CAP)

Spite kreskantan internacian uzadon de la angla kiel peranta lingvo en supera edukado, oni dediĉis malmultan atenton al la lingvorilataj spertoj de internaciaj studentoj en neanglalingvaj situacioj kie lokaj aŭ naciaj lingvoj estas uzataj por akademiaj celoj. La nuna studo esploras la lingvajn ideologiojn kaj praktikojn en grupo de internaciaj studentoj kiuj studas en kurso pri la ĉina lingvo por akademiaj celoj (CAP). Surbaze de granda etnografia studo, la konkludoj montras, ke (i) internaciaj studentoj emas konsideri la ĉinan kiel ŝarĝon malaltvaloran en scienco kaj teknologio, (ii) ili malmulte interesiĝas kaj havas malmultan motivigon por sekvi la kurson CAP pro diversaj komplikaj lingvaj, pedagogiaj, instituciaj kaj ideologiaj faktoroj, kaj (iii) ili sekvas multlingvajn praktikojn por potencigo en la klasoĉambro CAP. Tiu ĉi studo emfazas la bezonon de dinamikaj kaj loke enkadrigitaj lingvaj politikoj kaj studprograma planado por maksimumigi rezultojn por internaciaj studentoj, proponante perceptojn por la instruado kaj lernado de CAP en supera edukado kaj en Suda-Suda studenta moviĝemo en kaj preter Ĉinio.

- Seán Ó Riain: *Recenzo de «Pádraig Breandán Ó Laighin, 2022. Pobal na Gaeilge – Daonra, Institiúidí, Stádas, agus Cumhacht (La irlandparolanta komunumo – popolo, institucioj, statuso kaj povo)».*
- Alia Amir: *Recenzo de «Florence Bonacina-Pugh, 2024. Language policy as practice: Advancing the empirical turn in language policy research».*
- Yanzhen Tan & Yawen Han: *Recenzo de «Elvis Wagner, Aaron Olaf Batty, & Evelina Galaczi, 2024. The Routledge handbook of second language acquisition and listening».*
- Ilaria Fiorentini: *Recenzo de «Edoardo Lombardi Vallauri, 2024. Le guerre per la lingua. Piegare l'italiano per darsi ragione».*
- Haoxuan Kong & Juan Dong: *Recenzo de «Carolyn McKinney, Pinky Makoe & Virginia Zavala (Eds.), 2024. The Routledge handbook of multilingualism (2nd ed.)».*

- Liwen Chen & Jingxia Li: *Recenzo de «Huan Yik Lee, M. Obaidul Hamid & Ian Hardy, 2024. Language policy at the supranational level: English and the ASEAN».*

5.3 *Esperantologio / Esperanto Studies*

5.3.1 *Esperantologio / Esperanto Studies*, Nova Serio 7 (15) (2026). ISBN 9781595694515. ISSN 1311-3496.

5.3.1.1 *Enhavo*

- Christopher Gledhill kaj Klaus Schubert: *Antaŭparolo. Esperantismo kiel komunumo de diskursaj praktikoj*
- Mark Fettes: *Probal Dasgupta (1953–2026), Nekrologo*
- Alessandra Madella: *La Esperanto-eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton en la debatoj pri lingva edukado*

El la jarcento de eksperimentoj pri la lernado de Esperanto, fakuloj ankoraŭ alte taksas tiujn de la psikologo Edward Lee Thorndike de Universitato Columbia. Liaj eksperimentoj por *Internacia helplingva asocio* (IALA) okazis de 1925 al 1931 en Novjorko kaj Novanglio. Sekvis ilin la rilata sep-jara eksperimento de Helen S. Eaton pri Esperanto-bazitaj kursoj de «General language» (Ĝenerala lingvo). El kio fontas la daŭra atento pri la rezultoj de Thorndike ĉe la klera publiko? Certe gravis la internacia renomo de la psikologo mem, same kiel la financa povo kaj vastaj rilatoj de Alice Vanderbilt Morris, fondintino de IALA, kiu akompanis la edukajn eksperimentojn per scienca programo de interlingvistikaj esploroj. Tamen, mi argumentas, ke la ĉefa kialo de la daŭra influo de la eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton estis ilia kapablo paroli al publiko de usonaj eduk-specialistoj kaj lingvo-instruistoj, uzante la samajn terminojn kaj aktive partoprenante en iliaj tendencoj kaj debatoj.

- Rubèn Fernández Asensio: *Kontraŭ terminologio. La «arĥivista Esperanto», kiu neniam alvenis*

Por helpi esperantistojn kompreni la arĥivistajn terminojn, teorion kaj praktikon, kaj tiel pli bone akceptigi esperantajn arĥivojn, ĉi tiu artikolo revizias la terminaron proponitan de la *Internacia ĝenerala priskriba arĥivistika normo* (ISAD(G) – ICA s.j.b) kontraŭ la diversecon de ĝenerallingvaj konceptoj en angla, franca, hispana, germana kaj kataluna, kun aparta atento al la historio kaj evoluo de la vorto kaj koncepto «arĥivo» en diversaj lingvoj; ankaŭ la apliko de arĥivaj terminoj al informadiko estas diskutata. La komparo konkludas, ke kvankam arĥivistiko kiel fako ne bone solvis la diferencojn inter diversaj arĥivistaj tradicioj aŭ inter diversaj nekompareblaj nocisistemoj, la problemoj povas kuŝi en la terminologia teorio mem kaj en la nocio de «internacia harmoniigo», kiu ne plu estas praktikebla pro la hegemonio de la angla lingvo; tamen ankaŭ anstataŭigo de angla per Esperanto ne solvus la problemon de internacia terminologio. Ĉar arĥivistaj terminoj helpas internacian komunikon sed ankaŭ malhelpas komunikon kun la ĝenerala publiko, anstataŭ disvolvi apartan arĥivistikan terminaron en Esperanto estas proponata «malterminigo» per interveno en ĝenerallingvaj vortaroj; ankaŭ estas proponataj konsiloj por la transdono de esperantaj arĥivoj al publikaj arĥivistoj.

- Humphrey Tonkin: *Interlingvistiko kaj la koncepto de espero*

Zamenhof ne konceptis sian internacian lingvon kiel nuran praktikan solvon al praktika problemo sed kiel idealistan elpaŝon: la koncepto de espero estas esprimita en la pseŭdonimo mem de la aŭtoro – kiu fariĝis la nomo de la lingvo mem. En la unuan libreton kiu elskizis lian lingvon, Zamenhof metis la poemon «Mia penso», kiu spegulis la biblian koncepton de espero. La koncepto mem staris malantaŭ multaj internaciistaj proponoj de la epoko – kaj ankaŭ malantaŭ la pola naciismo. Vizitante Vaŝingtonon en 1910, Zamenhof aparte identigis Usonon kiel prezentantan similajn ideojn de espero, inkluzivo kaj libereco.

- James Hawkey: *Pri la studado de fonetika kaj fonologia variado en «disa» Esperantujo*

Parolantoj de Esperanto troviĝas disaj tra la mondo kaj ofte ne havas multe da kontakto inter si. Aldone, la lingvo estas ĉefe parolata nedenaske de homoj, kiuj havas tre diversajn denaskajn lingvojn. Tiuj du faktoroj gravas se oni volas pli profunde kompreni, kiel ni parolas Esperanton en la dudek-unua jarcento. Adopti variadisman aliron al la sociolingvistiko de Esperanto povas helpi pli bone kompreni la lingvon kaj ĝiajn parolantojn. En ĉi tiu artikolo, mi proponas la koncepton de «disa komunumo» por priskribi la manierojn, laŭ kiuj la esperantistaro diferencas de aliaj parolkomunumoj rilate al geografio, demografio, ideologio kaj praktiko. Sekve, mi reliefigas kelkajn praktikajn defiojn, kiuj aperas pro tiu diseco, kaj proponas eblajn solvojn. Fine, por instigi plian esploron pri fonetika kaj fonologia variado en Esperanto, mi prezentas superrigardon pri la segmenta fonologio de la lingvo. Tiu priskribo celas esti utila ilaro por estontaj fakuloj pri lingva variado en Esperanto, ĉar ĝi substrekas kie kaj kiam oni atendas trovi enparolantan variadon. La ĉefa celo de la artikolo estas provizi teoriajn kaj praktikajn rimedojn por pliaj studoj pri la sonsistemo de Esperanto en ĝia socia kunteksto.

- GONG Xiaofeng: *Deriva vortfarado en la ĉina, la angla kaj Esperanto: Tipologia komparo*

Ĉi tiu artikolo komparas la derivajn vortfarajn rimedojn en la lingvoj ĉina, angla kaj Esperanto. Ĝi montras, ke kvankam ĉiuj tri lingvoj uzas diversajn strategiojn por krei novajn leksikajn unuojn, la mekanismoj, gradoj de reguleco kaj nivelo de produktiveco varias signife. En la ĉina lingvo, vortfarado plejparte baziĝas sur kunmetado, dum derivaj fenomenoj aperas en la formo de afiksoj kaj limigita tonŝanĝo. Tonŝanĝo kun deriva funkcio estas rimarkinda trajto, per kiu verbo povas transformiĝi al substantivo aŭ alia vortospeco, ofte sen ŝanĝo de la skriba formo aŭ kun partaj skribŝanĝoj. En Esperanto, vortfarado estas tre regula kaj travidebla, bazita sur sisteme kombineblaj radikoj kaj afiksoj. En la angla, derivado prezentas miksitan sistemon kun afiksado, konvertiĝo kaj akcentŝanĝo. La studo montras, ke konsideri morfologiajn, fonologiajn kaj tipologiajn faktorojn estas fundamentaj por kompreni la naturon de deriva vortfarado.

- Ilona Koutny: *Morfologio de Esperanto*

En la lingvistika priskribo de Esperanto morfologio estas speciale grava: unuflanke la senŝanĝaj morfemoj kaj la produktiva, regula vortfarado signifas avantaĝon, sed aliflanke tie kaŝiĝas ankaŭ problemoj pri kiuj esperantologoj delonge diskutas kaj povas esti interesaj ankaŭ al ĝenerala lingvistiko, nome la fifama radikkaraktero. La artikolo donas

superrigardon pri la tereno de esperanta morfologio, ekde la difino kaj klasifiko de morfemoj tra la problemoj de vortfarado (derivado kaj kunmeto) ĝis la vortstrukturo kaj difino vortospecoj. La tipologia loko de Esperanto inter la naturaj lingvoj finas la prezenton. Analizatas diversaj aliroj al morfemoj kiel tiuj de la *Akademio de Esperanto*, Szerdahelyi ĝis la plej nova de Jansen. La aŭtorino mem proponas pluevoluigon.

- Marc van Oostendorp: *Word formation in Esperanto between Akademio and Functional discourse grammar. Review of the book: Jansen, Wim, 2024, Vortfarado en Esperanto, Rotterdam: Bero*

Vortfarado en Esperanto inter Akademio kaj Funkcia diskursa gramatiko. Recenzo de la libro: Jansen, Wim, 2024, Vortfarado en Esperanto, Rotterdam: Bero

Ĉi tiu artikolo lokas la postmortan monografion de Wim Jansen Vortfarado en Esperanto: Funkcigramatika analizo en du sciencaj tradicioj: la doktrino pri vortfarado eldonita en 1967 de la *Akademio de Esperanto*, surbaze de la analizoj de René de Saussure, kaj la nuntempa teorio de la Funkcia diskursa gramatiko (Hengeveld kaj Mackenzie 2008). Jansen priskribas la morfologion de Esperanto kiel kvarpartan leksikan maŝineraron, kiu konsistas el rekta radik-al-vorta konvertiĝo, derivado, kunmetado kaj enkorpiĝado, ĉiuj loĝantaj en la leksiko kaj formaligitaj per leksikaj funkcioj laŭ la senco de García Velasco kaj Keizer (2014). Mi argumentas, ke lia traktado konverĝas kun la klasika pozicio de la Akademio pri malgranda aro da substancaj punktoj, sed reformulas ĝin sur tute alia teoria nivelo: tie kie la Akademio proponas normigan sistemon enradikiĝintan en la *Fundamento*, Jansen proponas klarigan modelon bazitan sur produktado-orientita gramatiko. La konverĝoj kaj diverĝoj estas detale ekzamenataj, kun aparta atento al la statuso de la radikaj kategorioj, la leksika-kontraŭ-gramatika karaktero de *-ig* kaj *-iĝ*, kaj la analizo de endocentraj kaj eksocentraj kunmetaĵoj.

- *Esperantologio / La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*
- *Esperantologio / The Centre for Research and Documentation on World Language Problems (CED)*

5.4 *Investigationes Linguisticae*

5.5 *Beletra Almanako*

5.6 *Literatura Foiro*

Noto: Carlo Minnaja proponis, ke ni listigu ankaŭ la enhavon de *Literatura foiro* en IpI pro ĝiaj interlingvistikaj artikoloj. Tion ni kompreneble volonte faros. Ni ĝenerale bonvenigos ĉiujn ŝanĝproponojn kaj aliajn sugestojn pri IpI.

5.6.1 *Literatura Foiro*, 57(340) (aprilo 2026). ISSN: 0393-2907-26004.

5.6.1.1 *Enhavo*

- Artikoloj/eseoj/poemoj
 - Minosun: *Senneĝa vintro*
 - Giorgio Silfer: *Ĉu kabaredo kontraŭ kabareto?*
 - László Krasznahorkai: *Fragmentoj el satana alegorio*; tradukis József Horváth
 - Jua García del Río: *Franz Schubert: tro frue, tro genia*
 - Laure Patas d'Illiers: *Hippolyte*
 - Benoît Philippe: *Por vi*
 - Virginia Woolf: *Ĉambro por si (2)*; tradukis Stéphane Brault
 - Rafael dos Santos: *La aventuroj de sekreta agento*; tradukis Fernando Pita
 - Alessio Giordano: *Produktiva soleco kaj intelekta laboro*
 - Stella Meester: *La kuraĝo de la sincero*
 - Giorgio Silfer: *Nikolin' adiaŭis nin, sed ne ŝia voĉo*
 - Giacomo Comincini: *La konstelacio de la akvomelono*
 - Bibe Luyten: *Mi kaj Osamo Tezuka, la revokreanto*; tradukis Fernando Pita
 - Alberta Manni: *Hildegarda el Bingen: Homo simplex*; tradukis Carlo Minnaja
- Recenzoj
 - Manuela Ronco: *La mordo de Roger Ackroyd* de A. Christi, 2023
 - Perla Martinelli: *Patron serĉinta, de filo trovita* de V. Ošlak, 2025
 - Stano Keable: *Farango* de S. Johansson, 2025

5.6.2 *Literatura Foiro*, 57(341) (junio 2026). ISSN: 0393-2907-26004.

5.6.2.1 *Enhavo*

- Artikoloj/eseoj/poemoj
 - Carmen Mallia: *Odo al Kálmán Kalocsay*
 - Giorgio Silfer: *Gaje pirati antaŭ ol la mondo sinkos*
 - Giacomo Comincini: *Lasante naze*
 - Alessio Giordano: *Pri artefaktoj kaj papavo*
 - Massimo Acciai Baggiani: *Renkontiĝo*
 - Juan García del Río: *Keith Jarrett*
 - Renée Triolle: *Triokulaj poemoj*
 - Jado: *Heredaĵo kaj kresko*

- Esperanta PEN-Centro: *Nia lingvo en la poezia PEN-maratono*
 - Yin Jiaxin: *Stiri aŭton nokte*
 - Giorgio Silfer: *Historia filmo filigrane nuntempa*
 - Virginia Woolf: *Ĉampro nur por si (3)*; tradukis Stéphane Brault
 - LF-koop: *Gejunuloj diskutas pri raŭmismo*
 - Stella Meester: *Pli ol patrino, Elisabeth*
 - Núrya Perpinyà: *Penelopa ne plu atendas sian edzon*; tradukis Abel Montagut
 - Natania de Silva: *Nina Albright*; tradukis Fernando Pita
 - Isaac E. Babel': *Karl-Jankel*; tradukis Mikaelo Bronštejn
- Recenzoj
 - Giorgio Silfer: *La liberiĝo* de E. Tófalvy, 2019
 - Carlo Minnaja: *Che cos'è una lingua inventata* de D. Astori, 2026
 - Perla Martinelli: *Centvorte* de J. R. Noguerras, 2025

6 NOVAĴLETEROJ

6.1 *Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)*

6.1.1 **La lettre d'information de l'OEP**, 107 (junio/julio 2026).

IpI estas eldonaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191.

Por ricevi informon pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdatoj por numero de sekva monato estas: 28-a de februaro, 31-a de majo, 30-a de aŭgusto kaj 30-a de novembro. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ en alia lingvo.

Estraro de CED

**Mark FETTES (direktoro) ♦ Guilherme FIANS ♦ Klaus SCHUBERT
Humphrey TONKIN ♦ Michele GAZZOLA.**